

# La NASKa Fasko

Jurnalo de la Nord-Amerika Somera Kursaro de Esperanto, ĉe UT-Dalaso

vendredon, la 29-an de junio, 2012 • numero kvar

## Hodiaŭaj eventoj

★ 8:45 atm – 12:15 ptm:  
Kursoj



★ 12:15 – 1:00 ptm:  
Tagmanĝo

★ 3:00 – 3:45 ptm:  
Tejloro FRANCIS prezentos: “La vivo de (ankoraŭ vivanta) tornado-ĉasanto”

★ 5 – 6:30 ptm: Vespermanĝo

★ 7:30 – ??? ptm: Eventoj en la gufujo  
Unue LUSI HARMON gvidos kulturan programon kun kantado; poste restu por babili, frandi teon kaj kleriĝi.

## Teksasaj proverboj

de Johana HOENOW

- Ekzistas du teorioj por disputi kun virino. Neniu el la du funkcias.
- Se vi vidas, ke vi estas en truo, la plej urĝa afero estas ĉesi fosi.
- Neniam vangofrapu viron kiu maĉas tabakon.
- Ellasi katon el sako estas multe pli facile ol remeti ĝin enen.

### La NASKa Fasko

Redaktejo: Ĉambro 4.418  
<nask.esperanto@gmail.com>

La NASKa Fasko estas ĉiutaga informbulteno de la kursaro. Trovu ĝin matene sub via pordo aŭ en la “gufujo” en la 4-a etaĝo.

Se vi volas kontribui mallongan artikolon, foton, ŝercon, bildstrion, leteron, poemon, am-leteron, ktp. bonvolu alporti ĝin al la redaktejo en ĉambro 4.418, aŭ – eĉ pli bone – sendu ĝin al <nask.esperanto@gmail.com>.

## Logik-enigmo

de Alex (Aleks) ENGELBERG

En Usono, matematikistoj ŝatas solvi logik-enigmojn. Kelkaj logik-enigmoj temas pri kavaliroj kaj friponoj.

Mi komprenigos. Jen enigmo de kavaliro kaj fripono:

*Ambo, Bambo, Ĉambo, Dambo, kaj Edvardo estas homoj, kiuj loĝas ĉe insulo. Zando la Esploristo esploras tiun insulon. Li trovas la kvin homojn.*

*Ĉiu el Ambo, Bambo, Ĉambo, Dambo, kaj Edvardo estas kavaliro aŭ fripono. Zando ne scias, kiu estas.*

*Kavaliroj ĉiam estas veremaj. Friponoj ĉiam estas malveremaj.*

**Ambo diras:**

*“Bambo KAJ Ĉambo estas friponoj.”*

**Bambo diras:**

*“Ĉambo KAJ Dambo estas kavaliroj.”*

**Ĉambo diras:**

*“Dambo AŬ Edvardo estas fripono.”*

**Dambo diras:**

*“Bambo KAJ Edvardo estas kavaliroj.”*

**Edvardo diras:**

*“Ambo estas fripono.”*

Provu diveni: kiuj estas kavaliroj, kaj kiuj estas friponoj?

*Aperos morgaŭ la solvo.*

## La logikaj signifoj de KAJ / AŬ

Se oni diras “... KAJ ...”, tiu asertas ke AMBAŬ partoj de la frazo estas veraj. Se oni estas malverema, UNU AŬ DU partoj devas esti malveraj.

Se oni diras “... AŬ ...”, tiu asertas ke UNU AŬ DU partoj estas veraj. Se oni estas malverema, AMBAŬ partoj devas esti malveraj.



Diablo... kio okazas ĉi tie? Ĉu la NASKanoj ĉiuj fariĝis faŝistoj?! Tute ne. Ili nur salutas “sŭŭŭ”-e, laŭ la kutimo de UTD!